internacia gazeto por distro kaj amuzo

6 5/1985 ZAGREB

„KNABINO KUN LEONTODO"



Fotis Bolto Ranilović, la majstro de fotoarto

1985 – Internacia Junulara Jaro

Pli valoras tuj ovo, ol poste bovo.

NEKUTIMAJ FAKTOJ PRI


# HOMOJ

– Ĉe la plej multaj homoj, la barboharoj estas trioble pli dikaj ol la kapharoj.
– Ĉirkaŭ 63 procentojn de la homa korpo (ankaŭ de la musa) konsistiga akvo. En la korpkonsisto de elefanto estas eĉ 70 procentoj da akvo!
– Dum 50-jara vivado, homo eltrinkas ĉirkaŭ 15.000 l. da fluaĵo.
– La pli aĝaj homoj spiras pli rapide ol la junaj kaj la virinoj spiras pli rapide ol la viroj.
– Laŭ la opinio de iuj fakuloj, homo plene maturiĝas ĉirkaŭ la 60-a jaro.
– La meza vivaĝo en la malnova Grekio estis 33 jaroj.
– La kapharoj kreskas je mezrapido de 0,3 ĝis 0,4 mm tage.
– Esploroj malkovris ke antaŭ 50 jaroj la Eŭropanoj ridis proksimume 20 minutojn tage. Hodiaŭ ili ridas nur 6 minutojn tage.
– La homa cerbo konsistigas ĉ. 2 procentojn de la pezo, tamen la korpo uzas 25 procentojn de la oksigeno. Ĉe dikuloj tiu misproporcio estas eĉ pli granda.
– Homo en la tuta sango havas ĉ. 18 miliardojn da ruĝaj globetoj.
– La ostoj de plenkreskulo enhavas kvanton da kalko kiu sufiĉus por blankigi tutan muron de granda ĉambro.
– Ĉiunokte dum la dormado homo turniĝas tridekfoje.
– La homspecio (homo sapiens) ekzistas ĉ. 500.000 jarojn kaj dum tiu tempo naskiĝis kaj mortis ĉ. 74 miliardoj da homoj.
– En Hindio ĉiujare mortas 50.000 homoj pro mordo de venenaj serpentoj, plej multe de kobro.
– De la naskiĝo ĝis la plena maturiĝo la homa korpo pliigas sian pezon ĉ. dudekoble, dum la plezo de la cerbo kreskas nur trioble.
– Nanoj, eĉ se ambaŭ gepatroj estas etkreskaj, havas normale altajn infanojn.
– Iuj esploroj montras ke infanoj pli rapide kreskas printempe kaj somere ol aŭtune kaj vintre.
– En la jaro 2000, la plej multaj homoj estos kalvaj, asertas venezuelaj scienculoj, pro la malpurigo de la homĉirkaŭaĵo, la preparaĵoj por harprizorgo kaj la animskuoj.
– Malmultaj homoj scias ke la 26 ostoj de la piedo pezas nur 125 gramojn, kvankam ili ofte devas porti pezojn pli grandajn ol 100 kg.
– Fakuloj elkalkulis ke la rapideco de boksa frapo estas kvindeko da km/h kaj la frapo de pezkategoria boksisto povas atingi forton superan je kvin tunoj.
– Esploroj pruvis ke dum la malhelaj kaj pluvaj tagoj homo spirite kaj korpe multe pli bone laboras ol dum la sunaj.
– Plenkreskulo povas stari sur strut-ovo ne rompante ĝin.
– Artistoj ĝenerale, aparte pentristoj kaj verkistoj pli facile viktimiĝas de deprimoj ol la homoj de aliaj profesioj. En Usono eĉ 38 procentoj de la artistoj suferas pro deprimaj perturboj.
– Laŭ antaŭnelonge publikigita esploro, la loĝantoj de Usono portas sur siaj korpoj du milionojn da tunoj da troa graso.
– Vintre, pro la malvarma vetero, ni manĝas pli ol somere ĉar la korpo bezonas pli grandan kvanton da „brulaĵo" por plutenadi la naturan varmecon.
– Belaj virinoj ne estas pli feliĉaj en la vivo ol tiuj, kiujn la naturo malpli favoris. Statistikaj informoj montras ke la belaj virinoj estas pli oftaj vizitantoj de la psikiatroj kaj la nombro de memmortigoj aŭ memmortigaj klopodoj ĉe la belulinoj estas pli granda ol ĉe la ceteraj virinoj.
– Homo pli bone dormas se ties kapo estas turnita al la nordo, kaj la piedoj al la sudo, harmonie kun la meĥanismo de la Tera kurento.
– Baldaŭ post la edziniĝo la voĉo de ĉiu junulino maldelikatiĝas kaj ne plu estas tiel ĉarma kiel en la momento kiam ŝi eldiris la decidigan „jes"-on. La sciencistino Gisela Bier el Munkeno, kiu pristudas la homan voĉon, konsideras ke tiu ŝanĝo aperas pro la animskuoj (stresoj) kaj la streĉeco en la geedza vivo.
– Vintra dormado sub 2-kilograma litkovrilo, kun natura spirado je rapideco de 16 spiroj minute, tiel ŝarĝas dum 8-hora dormado la dormanton ... ĉar li per la brusto levas suman pezon de 16.000 kilogramoj.

Certe vi jam eknotis, ke nia verda koloro kaj la flago mem, kiun ni estimas – ne motriĝas ĉiam unutonaj. Ĉi-tie povas ekzisti en la limoj de la sama verdo diversaj nuancoj. Kaj simile kiel okulo de sperta pentristo scipovas difini la kolorajn deviojn, samtiel iu esperantisto povas dividi la „verdan familion", ĉar „unutone verda" montriĝas nur nia Esperanto-lingvo mem. Koncerne ĝian parolantaron – ĉi-tie regas grandaj diferencoj. Mi provis finspuri la ĉefajn nuancojn de unuopuloj en nia movado ... Verŝajne vi ankaŭ ekvidos vin mem en tiu spegulo:




LA „ETERNAJ KOMENCANTOJ": Oni povas trovi ilin en kiu ajn Esperanto-klubo. La grado de lingvoscio ĉe ili estas malalta, sed la rilato al la lingvo serioza kaj ofte eĉ pli serioza, ol ĉe profesiaj lingvistoj. Ili estas pretaj aŭskultadi Esperanto-paroladon, des pli atenteme, ju pli malmulte ili komprenas ĝin. La „esperantisteco" ĉe ili plejparte kulminas je ornamiĝo per okulfrapaj insignoj, ĉar ili tre ŝatas diversajn signojn de tutmonda frateco. Tamen la verduloj de tiu-ĉi tipo oftfoje estas pretaj helpi ĉe la laboro en klubo, organizadi diversajn Esperanto-aranĝojn, ekskursojn, renkontiĝojn. Kiam ili devas paroli, ili estiĝas tute mutaj. Anstataŭ tio ili ŝatas skribi, ĉiam kunportante grandformatan kajeron en kiun ili enskribadas novajn vortojn. Ofte el tiuj-ĉi vortoj por praktika komunikado ili uzas nur tri: „Mi estas komencanto"! – magiaj por ĉiu alia esperantisto, ĉar tiu, kiu eldiris tiujn vortojn kun nefalsaj seriozeco kaj embaraso, povas esti certa pri la bonkora simpatio de ĉiu esperantisto.



Desegnis Jirka Tomečkova

PLEDO POR SOCIOLOGIO DE L' VERDISMO

# Verdeta, verda, verdega

LA „ĈIESAJ FRATOJ KAJ FRATINOJ": Esperantistoj de tiu-ĉi tipo pririgardas Esperanton, kiel formon de amo. Ili amas ĉiujn: esperantistojn pro tio, ke ili konas Esperanton, aliajn pro tio, ke kompatinde ili ankoraŭ ne konas ĝin. Se vi korespondas kun ili, poste ili ĉiam estas pretaj kisadi kaj brakumi vin. La amo estas ĉe ili neatendema kaj impeta. Nu, kiam vi ne reciprokas ĝin, ili ne tro malĝojas. En la mondo ja troviĝas tiom da multe amindaj objektoj – kaj ne nur Esperanto...




LA „TUTMONDEMULOJ" estas esperantistoj kun forte esprimita inklino al la grandeco. La internacian lingvon ili ellernis ĉefe pro tio, ke la naciaj limoj estas tro malvastaj por ilia agaddeziro. Ankoraŭ ne posedante sufiĉe bone la lingvon, ili tuj komencas kreadi diversajn organizojn kaj aranĝojn. Ilin inspiras ĉiu organizo, se antaŭ ĝia nomo oni povas lokigi la adjektivon „tutmonda". Tre ŝatata montriĝas ankaŭ por ili la prefikso „sen-". Sendependa, sennacieca, senlima, senŝtata ktp. Ĉi-tiuj titoloj ĉiam trovas sian lokon en ilia koro. Probable, ili volus liberiĝi de ĉio kaj resti nudaj kun sia „tutmondeco". Esperanto estas por ili nur speco de apogbastono, dank' al kiu ili volus forsalti de nia peka ter-disparteco, ĝis la sankta unuiĝo. Verŝajne ili iam sukcesos realigi sian revon, se la bastono ne rompiĝos sub la ŝarĝo de idealoj.




LA „LOKAJ PATRIOTOJ". Tiuj-ĉi homoj ellernis la internacian lingvon nur por rakonti al ĉiuj aliaj esperantistoj pri la loko, kie ili naskiĝis estante konvinkitaj, ke ĉiuj aliaj sopiras nur pri detalaj informoj el ĉi-tiu spaco. Ilia fervoreco kaj strebado por konatigi ĉiujn kun la regionaj popol-moroj, kostumoj, trinkaĵoj estas mirinda. Se ili portas verdan stelon, tiam nur sur la fono de la nacia kostumo. Ili ne povas ĝisfine pardoni al Esperanto ke ĝi ne estas ilia gepatra lingvo.




LA „AMUZEMAJ ESPERANTISTOJ". Ilin interesas nek la problemoj tutmondaj, nek la lokaj. Dum Esperanto-renkontiĝoj ili kutime silentas, kiam oni prelegas – silentas aŭ ekdormas, kiam oni priparolas organizajn demandojn. Kaj nur kiam komenciĝas amika vespermanĝo, libera amuzo kun rido kaj ŝercoj, tiam iliaj okuloj komencas brili kaj ili rapide estiĝas la ĉefa „animo kaj spirito" de la vespero. La ĉefa afero de ilia komunikado kuŝas sur la bazo de tiklemaj ankedotoj kun kiuj ili „gajigas" prefere ĉeestantajn damojn, kiuj poste ruĝiĝas kaj aspektas sane.




LA „SOLIDAJ MAMZELOJ KAJ SINJOROJ" estas la esperantista aristokratio. Ili ne parolas tiel multe, kiel la „amuzemaj verduloj" kaj en esperantista societo ofte sidas aparte kaj silentas, sed eĉ laŭ ilia silento oni povas ekkoni, ke ilia lingvoscio estas alta. Plejparte ili komunikas nur unu kun alia, preskaŭ ne kontaktante kun verduloj de aliaj tipoj. Esperanto estas por ili ornamo kaj ili estas ornamo por Esperanto. De tempo al tempo ili ornamas ankaŭ la prezidiojn de diversaj esperantistaj kunsidoj per sia ĉeesto. Ili tre ŝatas skribi leterojn, korespondante kun „damoj kaj sinjoroj" similaj al ili mem. Se iliaj adresoj estas publikigataj en Internacia adresaro, la atentigo je lingvoj, kiujn ili posedas, estas kutime tre longa kaj aspektas ekzemple: E, A, R, F, G, H, I, P, U, Ido.





LA „PURAJ LINGVISTOJ" tre bone scias la lingvon, sed pro ilia fako havas inklinon konstante analizi kaj perfektigi ĝin. Tial, ke ili ĉiutempe komparadas Esperanton kun aliaj lingvoj, ilia verda koloro povas deverdiĝi, miksiĝinte kun aliaj koloroj.

Do kiu ja staras sur la pinto de monto Esperanto? Ni povus nomi tiun-ĉi tipon, kiun ankaŭ oni povas trovi en ĉiu klubo. Li diligente lernas la lingvon, atenteme aŭskultas la instruiston, fervore deklamas versaĵojn, montrante konsiderindajn lingvajn kapablojn. Tio estas la „multpromesanta infano" – la estonta esperantisto de pure verda koloro. Kien li plu iros? Ĉu antaŭen aŭ reen? Tio jam dependas de ni – la tipe dividita esperantistaro.

▲

Ralph HARRY

# La emuo



Emuo (Dromaius novaehollandiae)

## ĈAMPIONA DEMETANTO DE OVOJ

La plej grandajn ovojn en la mondo demetas du grandegaj birdoj – la struto kaj la dromiceo, pli bone konata kiel „emuo".

La struto de Afriko estas fama pro sia kutimo enŝovi la kapon en la sablon, kiam malamiko venas. Ĝi imagas, ke, ĉar ĝi ne povas vidi tial ĝi estas nevidebla. Pro tio ni nomas „struto" homon, kiu fermas la okulojn antaŭ la faktoj.

La emuo estas tre bone konata en Aŭstralio, la kontinento kie ĝi loĝas, sed ne tiel bone konata en aliaj landoj. Do, ni konatiĝu iomete kun tiu ovodemetanto.

Emuoj estas inter 150 kaj 180 centimetrojn altaj. Iliaj korpoj estas kovritaj per brun-nigraj plumoj. Ili havas preskaŭ neniun voston, kaj, ĉar la „flugiloj" estas tre malgrandaj ili tute ne povas flugi. Ŝajne iu praavo ne uzis siajn flugilojn kaj iom post iom la familio perdis la povon flugi. Sed ili ja povas kuri, treege rapide, dum longaj periodoj je rapideco ĝis 50 kilometroj en horo.

La indiĝenoj de Aŭstralio dum jarmiloj ĉasadis la emuojn – kompreneble ne kiel sporto sed por havi nutraĵon. Por kapti la grandajn birdojn ili uzis retojn, kaptoŝnurojn, truojn en la tero, kaj eĉ narkotajn plantojn por konfuzi la kaptotajn. La indiĝenoj bone konis la kutimojn kaj postsignojn de la emuo kaj imitis ĝiajn movojn en dancoj, eĉ pentris ĝian portreton sur arboŝelon.

La nederlandaj maristoj, kiuj vizitis la marbordon de okcidenta Aŭstralio en la 17-a jarcento vidis piedsignojn de emuoj, sed ne la birdon mem. Nur en 1788, kiam angloj alvenis al la loko sur la orienta marbordo, kie nun troviĝas la granda urbo Sidnejo, eŭropanoj la unuan fojon vidis emuaron. Ili nomis ĝin „emu", ĉar ĝi similis al bildo, kiun ili havis, de la reao de Sud-Ameriko, kie tiu grupo de grandaj birdoj estis nomata en la portugala lingvo „ema". Poste la sciencistoj donis al ĝi la sciencan nomon „dromaius novaehollandiae" (dromiceo de nova nederlando) laŭ la tiama nomo de la kontinento.

Dum la pasintaj 200 jaroj la aŭstralianoj faris bienojn kaj konstruis urbojn en multaj lokoj, kie la emuoj libere vagadis en fruaj tempoj. Bienuloj mortigis dekmilojn da emuoj, kiuj rompis barilojn kaj manĝis la grenon kaj disvastigis malbonajn kaktojn kaj aliajn plantojn. Tamen la emuoj supervivis kaj nun centmiloj vivas en preskaŭ ĉiu regiono de la kontinento. Ankaŭ estas grandaj ŝtataj parkoj, kie la emuoj estas tute protektataj.

La modernaj aŭstralianoj ankaŭ studas la movojn de la emuoj. En la armeo, kiam la soldatoj devis kolekti pecojn de rubaĵo el sur la tero en la tendaro, oni nomis la aferon „emu-parado" ĉar oni opiniis ĝin simila al la perbeka kolektado de insektoj fare de la emuo.

En aŭstraliaj hejmoj oni kelkfoje vidis sur la kamenbreto ŝelon de emua ovo, malhele verda, granda kiel la kapo de bebo. Ĝi staris sur ligna fundamento, aŭ en la formo de taso, kun tenilo, ĉar la ovo de emuo ne estas facile rompebla, kiel tiuj de la proverboj.

Do, kiel grandaj estas la ĉampion-ovoj? La emuo demetas kutime 7 ĝis 9 ovojn, kaj ĉiu pezas ĉirkaŭ 700 gramojn. Tio signifas, ke emuino demetas en sian neston sur la tero ĉ. 6,3 kilogramojn da ovoj. Unu tia ovo faras bonan omleton. Por bolkuiri ĝin oni bezonas ĉirkaŭ 20 minutojn! Post la demeto de siaj ovoj la emuino libertempas, aŭ pli ĝuste fariĝas la nutraĵkolektanto. La edzo kovas la ovojn ĝis la emuidoj aperas.

Oni rakontas pri aŭstralia knabo kiu decidis, kiel hobio bredi kelkajn bantamojn, malgrandajn gekokojn. Sed li malĝoje trovis, ke la ovoj de bantamoj estas treege malgrandaj. Unu tagon lia patro rimarkis, ke emua ovo, kiu kutime staras sur la kamenbreto, malaperis. Li retrovis ĝin pendantan per ŝnuro en la bantamejo, kun afiŝo: RIGARDADU ĈI TIUN, KAJ FARU VIAN PLEJ BONAN!

Nu, la aŭstralia popolo tiel ŝatas la emuon, ke ĝi estas parto de la nacia blazono, la insigno de la regno, kiu troviĝas je la supro de gravaj oficialaj paperoj, kaj sur monero de 50 cendoj. Je unu flanko de ŝildo staras kanguruo. Je la alia flanko, vid-al-vide, fiere staras emuo. La devizo de la lando estas: „Antaŭen, bela Aŭstralio!". Kelkaj diras, ke oni elektis la emuon, ĉar ĝi ne povas iri malantaŭen. Sed mi preferas kredi, ke sur la blazono estas emuino, mondĉampiona ovodemetanto.



DAMIR MIKULIĈIĈ

# LA MAJSTRO-VERKO

Kiel kutime, li enĵetis la monon en la aŭtomaton de memserva benzinstacio. Li preferis ilin pli ol la staciojn kun deĵorantaj vendistoj. La benzino fluis tra la gumtubo kaj li sentis la agrablan malvarmon de la metala pistolo. La posttagmeza veturo ĝis lia laboratorio estis la lasta ŝanco ke li ankoraŭfoje en trankvilo pripensu pri la ĉivespera interkonsentita eksperimento rilatanta la konduton de la nova bakteria specio kaŝanta sin sub la kodnomo dek nulo kvin.

Okupita pri siaj pensoj li veturis malrapide. Post nuraj kelkkilometroj li rimarkis ke la aŭtomobilo perdas la rapidecon, kvankam lia piedo estis daŭre premanta la akcelilon. La veturilo haltis de si mem, la motoro estis mortsilenta. Pli pro pura scivolemo ol pro ia vera kapablo ripari la subitan kaj strangan difekton de la motoro, li levis la kapoton. Aktorante al si mem spertan aŭtoripariston li per rigardo ekzamenis la motoron kaj per unu mano tuŝadis la kablojn. Lia rigardo falis tiam hazarde al la plastika transparenta tubeto tra kiu la benzino alfluis en la karburilon. La okuloj restis fiksitaj je la tubeto. Li eksentis inundon de timego en si.

En la unua momento, dum kiu la lavango de alvenantaj pripensoj trabatis la vojon ĝis la plena kompreniĝo de la ekvidita detalo, ĉio turniĝis ĉirkaŭ li. Li falis pro malforto surgenuen, sentante akran doloron en la tempioj kaj ekĝemis silente „ne, ne, ne ...". Lia dekstra mano, temanta de l' timo, malrapide, centimetron post centimetro, alproksimiĝadis al la karburilo. Ne, ne povas ja tio esti, li senĉese ripetadis, ne povas tio esti, li devas ektuŝi ĝin, li devas konvinkiĝi ke estas la fino ...

Per subita movo, por kiu li devis kolekti ĉiujn ankoraŭ postrestintajn fortojn el la duonmortaj fingroj, li elŝiris la tubeton el la karburilo. Nubeto de arde ruĝa fumo leviĝis portata per la vento alten kaj li ekkonis en ĝi sian malesperon. La malesperon de falinta gladiatoro kiu nur atendas ankoraŭ la lastan mortofrapon sciante ke Cezaro ĉifoje estos senindulga. Miliardoj da bakterioj de la specio dek nulo kvin dancis en la aero kvazaŭ mokante lian senpovon, dum li freneze kaj ankoraŭ surgenue vane mansvingis ĉasante la tufojn de la ruĝa fumopolvo kiu propagiĝis aeren.

Liaj manoj! Li observis ilin. Ĉu ili kulpas? Li ne povis rememori kie kaj kiel estis farita la eraro. Ĉio estis perfekte steriligita, trifoje sekurigita. Kiel li estis povinta elporti el la laboratorio ĉi mutacintajn bakteriojn? Li estis certa ke ĝuste li tion



kaŭzis ĉar alie li jam estus informita, jes, ĉiuj estus sciintaj jam. Tre rapide.

La bakterioj de la specio dek nulo kvin, produktitaj per lia metodo de gentransformado, estis lia majstro-verko.

Sed tro bona majstro-verko.

Tro bona ke ĝi estu uzebla por tio por kio ĝi estis en la komenco planita: rimedo por purigado de marakvo okaze de akcidentoj de naftotransportaj ŝipoj. Ĉi tiuj bakterioj disociadis nome la nafton kaj dum tiu procezo multobliĝis cent milionoble pli rapide ol povis esti tolereble.

Unu aŭtomobilo aperis sur la vojkurbiĝo kaj li unue ekdeziris haltigi ĝin, sed tuj ŝanĝis la intencon. Sensence. Kvazaŭ en ia morna sonĝo havante plumbajn gambojn, li daŭrigis la vojon piedire. Nur kelkajn kilometrojn. Tre bone li sciis ke piedirado estas de nun la sola maniero atingi la laboratorion sen ia denova interrompo de la veturado. La tempon li havas, cetere. Morgaŭ li ne ekskursos kun la tuta familio. Nek per aŭtomobilo, nek per io ajn.

Kaj ne nur li.

# LA MONDO LUDAS

*Ovo klopodos en ĉiu numero prezenti kelkajn ludojn aŭ skeĉtekstojn uzeblajn kiel ekzercoj en A-kursoj aŭ dum klubvesperoj, renkontiĝoj, libertempo ktp. Kontribuu ankaŭ vi! Bonvenaj estas ankaŭ ĉiuspecaj naciaj porinfanaj ludoj.*

## AMUZA TEKSTO-KOMPLETIGO

Por plivigligi la instruhoron kaj samtempe plifortigi la uzon de adjektivoj, la instruisto povas organizi la sekvan ludon:
La instruisto aŭ iu alia el la grupo sekrete preparas unupaĝan tekston pri la grupo mem, sed sen adjektivoj kaj adverboj. Ĉiam kiam oni devus uzi adjektivon aŭ adverbon en la teksto estu libera spaco. Ekz.:

Nia .................... grupo konsistas el 10 ................ gelernantoj. Inter ili estas 3 .................... knaboj kaj 7 ............... knabinoj. Ili ĉiuj estas ankaŭ tre ........................ . Nia instruisto estas ........................ kaj .................. . Liaj prelegoj estas .................. kaj aŭdante ilin ni ĉiuj .................. dormas. Maria estas nia plej .................. knabino, kaj .................... Marko estas la plej ............... . Nia ............... Andrea sidas kun ..................... Jan.

Tiam la instruisto petu la gelernantojn diri kelkajn adverbojn kaj adjektivojn. Per ili li kompletigu la tekston, sed li metu ilin laŭ la vico en kiu la gelernantoj diris ilin. Se la adverboj kaj adjektivoj estus ekzemple: maldiligenta, malbona, alta, nigra, flava, rapida, malinteresa ... la teksto aspektus jene:

Nia **maldiligenta** grupo konsistas el 10 **malbonaj** gelernantoj. Inter ili estas 3 **altaj** knaboj kaj 7 **nigraj** kanbinoj. Ili ĉiuj estas ankaŭ tre **flavaj**. Nia instruisto estas **rapida** kaj **malinteresa** ...



Fotis Ivica Špoljarec – Štef

## SURPRIZIGA DEMAND-RESPONDADO

Tiu ludo estas unu el la tre bonaj ekzercoj, uzebla proksimume post la 5-a leciono de A-kurso (laŭ la Zagreba metodo post la 3-a leciono), ĉar ĝi estas tre amuza kaj igas la gekursanojn ĝoji kaj apenaŭ atendi la saman ekzercon alifoje. La amuzo same grandas por infanoj kaj gejunuloj kiel por la plenkreskuloj. Jen la priskribo:

Ĉiuj kursanoj senkonsidere pri la nombro sidiĝu en rondon. Ĉiu havu neskribitan paperon kaj krajonon.
La instruisto diktas la unuan demandon:

1. KIU ESTAS LI ?

Ĉiuj skribas sur la plej supran parton de sia papero nomon de vira persono al ĉiuj en la kurso konata (aŭ iu el la kursanoj aŭ iu el ĝenerale famaj personoj).
Post tio ĉiuj faldas la paperon tiel ke ne vidiĝu la respondo

Post la faldo, la skribinto donas sian paperon al sia dekstra najbaro. Nun la instruisto diktas la duan demandon:

2. KIU ESTAS ŜI?

Ĉiuj skribas nomon de virina persono konata al ĉiuj kursanoj sur la papero ricevita de sia maldekstra najbaro sub tiu faldita parto .
Kaj ili denove faldas la paperon tiel ke tio ĉi ne vidiĝu kaj pludonas ĝin al sia dekstra najbaro .
Laŭ la sama principo la instruisto diktas la jenajn pliajn demandojn:

3. KIE ILI RENKONTIĜAS?
4. KION LI DIRAS AL ŜI?
5. KION ŜI RESPONDAS?
6. KION ILI FARAS?
7. KIO ESTAS LA REZULTO DE TIU FARO?
8. KION ALIAJ HOMOJ DIRAS PRI TIO?

Tiam la instruisto kolektos ĉiujn paperojn, malfaldos ilin kaj legos la respondojn.
Ĉar ĉiu persono skribis ĉiam respondojn pensante pri la renkonto de tiu paro kiun li imagis, sed la respondoj intermiksiĝis, la responda tuto estos plena je absurdaj ridindaj situacioj kiuj tre amuzos la lernantojn. La tuta ludo daŭras inter 10 kaj 15 minutojn.
Jen ekzemplo de tia miksaĵo:

| | |
|---|---|
| KIU ESTAS LI? | Ronald Regan |
| KIU ESTAS ŜI? | Flóra Szabó-Felső |
| KIE ILI RENKONTIĜAS? | En zoologia ĝardeno |
| KION LI DIRAS? | Via agado estas tre malneŭtrala. |
| KION ŜI RESPONDAS? | Miaŭ ... miaŭ ... |
| KION ILI FARAS? | Rigardas filmon „Militaj ludoj" |
| KIO ESTAS LA REZULTO DE TIO? | Multaj novaj esperantistoj. |
| KION ALIAJ HOMOJ DIRAS PRI TIO? | Kiaj malsaĝuloj, ili povis pli saĝe utiligi sian tempon. |

LEGENDO PRI

# MARKO

Iu malriĉa kamparano formanĝis en gastejo du kuiritajn ovojn kaj pecon da pano, sed li ne povis pagi. La gastejestro atendis tiun ĉi pagon dek jarojn, poste li iris al la reĝo Marko por plendi: „Antaŭ dek jaroj iu kamparano el mia loĝloko formanĝis en mia gastejo du kuiritajn ovojn kaj pecon da pano, kaj ĝis nun li ne pagis. La kamparano min multe domaĝis. De tiuj du ovoj mi havus du kokinojn, ili havus ovojn kaj poste elkovus kokidojn. Tiuj ĉi kokidoj kreskus, naskus novajn kokidojn ... Mi kalkulis, kun mia edzino, kaj mi konkludis ke dum dek jaroj mi gajnus helpe de tiuj du ovoj multe da mono, por la ovoj kaj la gekokoj... Mi petas vin postuli de la kamparano pagi al mi la ŝuldon."

Marko pacience aŭskultis la gastejestron kaj promesis helpi. Baldaŭ Marko invitis siajn korteganojn kaj demandis pri ilia opinio. Post longa pripensado ili diris ke la gastejestro pravas, ĉar li postulas la ŝuldon.

„Bone, diris Marko, mi volas diri al vi ankoraŭ ion. Mia kampo devas esti morgaŭ prisemita. Preparu boligitan tritikon".

La korteganoj ekrigardis unu la alian, kaj la plej kuraĝa el ili diris al Marko:


„Ni faros kiel vi postulas, sed kiel ĝermos la boligita tritiko?".

Marko respondis:

„La boligita tritiko ĝermos same kiel la kokidoj naskiĝos el kuiritaj ovoj."


La korteganoj post tiuj ĉi vortoj de la reĝo Marko ŝanĝis la opinion, ankaŭ la gastejestro.

(La popolan legendon tradukis Branka Leontić)




LA PONTO DE

# KARLO



Nekalkulebla nombro da homoj transiris la plej malnovan ponton de Eŭropo, la ponton de Karlo la Kvara en Praha. Sed kiu el ili scias ke la ponto estis konstruata ankaŭ el ovoj? Antaŭ ol mi rakontos al vi kiel tio okazis, permesu mencii, ke la ponto estas la dua sur la sama loko.

Jam de la jaro 1170 estis tie ŝtona ponto, la dua en meza Eŭropo post la regensburga, ĝi havis la nomon: Ponto de Judita, laŭ la edzino de Vladislav la Unua. Ĝi staris tie ĝis la jaro 1342, kiam inundo detruis ĝin. Restas nur pontoturo, tiu pli malgranda el turoj de Malá Strana. Kiam vi eniros la domon apud ĝi staranta, vi trovos en la unua etaĝo sub vitro, reliefon kiu montras junulon genuantan antaŭ iu reĝo. Kiuj estas tiuj du ne estas ĝis nun konate. Interese estas, ke ambaŭ turoj ne estas en la ponta akso, ĉar ambaŭ staras en akso de la iama Judita ponto. Aŭ pli bone dirite, la pli malgranda, romanikstila, dum la pli granda devenas el la konstruado de la nova ponto.


La novan ponton ordonis konstrui la reĝo Karlo la Kvara en la jaro 1357 kaj la konstruadon plenumis dudeksepjara arkitekto, Petro Parléř. De tiu tempo iras famo, ke la reĝo diskonigis, ke por plifortigi la morteron estas bezonataj ovoj. El ĉiuj anguloj de reĝlando Bohemio venis kaj alveturis kamparanoj kun ovoj. Ankaŭ el urbo Velvary alveturis kelkaj veturiloj. Sed surprizo por ĉiuj estis, ke la ovoj estis kuiritaj, ĉar la velvaranoj timis, ke la ovoj rompiĝos dum la longa vojo. Ne kun ĝojo pri bone farita ago ili revenis hejmen, sed kun granda moko. Tamen mi pensas, ke ne tiel malbone estis, ĉar ili preparis por ĉiuj grandan ovan festenon, kian Bohemio neniam antaŭe vidis.


Ke ovoj plifortigis la ponton atestas tio, ke post longegaj kaj ofte teruraj jaroj la ponto staras ĝis nun, kaj certe ankoraŭ ĝi staros dum jarcentoj.

Finante mi aldonu kelkajn indikojn pri ĝi: la ponto longas 516 m, larĝas proksimume 10 m, staras sur 16 pilieroj. Al ĝi apartenas 3 turoj. Unu sur la bordo de Staré Město (la plej bela pontoturo de Eŭropo el la jaro 1391), du sur la bordo de Malá Strana. La pli malgranda el la tria kvarono de la 12-a jarcento, kaj la pligranda el la dua duono de la 15-a jarcento. Sur la ponto troviĝas 30 statuoj.

Jaroslav Kašparec, Ĉeĥoslovakio

# KIKO


KION NI LUDOS? LA LULILO KAJ LA TOBOGANO JAM EKTEDIS NIN.
NI BEZONAS ION NOVAN POR AMUZI KAJ FELIĈIGI NIN.
MI PROPONAS, KE NI MEM KONSTRUU TUNELON DE FELIĈO, SED POR TIU INVESTO NI DEVAS MEM KONTRIBUI.
TUNELON DE FELIĈO?!
KIO ESTAS TIO?
ĈIU DONU PO DU DINAROJN KAJ MI AKIROS LA MATERIALON POR LA KONSTRUAĴO.
JEN, KONTRAŬ MALMULTA MONO NI HAVOS PROPRAN LUDAĴON.
LA SKATOLO ESTAS MALPEZA, KVAZAŬ ĜI ESTUS MALPLENA
ĜUSTE. ĜI ESTAS KAVA KAJ MALPLENA SED JA HAVAS SONORAN NOMON.
TUN
KAJ NUN SEKVAS LA SOLENA MOMENTO POR TONDO DE LA RUBANDO KAJ MALFERMO DE KONSTRUAĴO KIU CERTE NE KREOS PERDOJN. EN ĜI NENIU PEREOS. EL ĜI ĈIUJ POVAS ELIRI FELIĈAJ.
TUNELO DE FELIĈO


ĈI TIE LUDANTE VI EKZERCAS KLINIĜADON, RAMPADON KAJ TRAŜOVIĜADON KAJ VI ELIRAS FELIĈAJ KAJ KONTENTAJ.
TUNELO DE FELIĈO
MI TRAŜOVIĜADAS JAM DUONHORON KAJ ANKORAŬ NE KOMPRENAS EN KIO KUŜAS LA FELIĈO.
VI RESTIS VIVA KAJ SANA. ĈU TIO NE ESTAS FELIĈO?
TIO ESTAS STULTA KAJ SENUTILA LUDO.
SE ĜI NE MALUTILAS, TIO SIGNIFAS KE ĜI UTILAS.
LA SKAIOLON VI RICEVIS SENPAGE KAJ POR NIA MONO VI MANĜAS GLACIAĴON.
DO, TAMEN LA LUDO NE ESTAS SENSENCA.
PERE DE ĜI VI EKSCIIS KE EKZISTAS MULTAJ KAVAJ AFEROJ EL KIUJ PROFITON TIRAS NUR TIU KIU EL TIO FARAS SIAN LUDON.

## VERA VETERANO

En majo ĉi-jare, fosantoj de argilo en granda fosejo proksime al la urbo Peterbourgh („urbo de Petro") en orienta Anglio elfosis surprizan fosilion. Temis pri la restaĵoj de krokodilo, kiu, laŭ fakuloj, estas jam aĝa 150 milionojn da jaroj. Laŭ la indikoj, ĝi estis akvobesto, longa ĉirkaŭ 2,5 metrojn, ne kun ordinaraj piedoj por la tero, sed kun palmopiedoj por enakva vivado; kaj sur la dorso estis granda kilo-naĝilo, kiel ĉe moderna ŝarko.

Almenaŭ tiun krokodilon oni ne rajtus riproĉi, ke li devus ĉi tie paroli Esperanton!

Marjorie Boulton, Britio

## SEKSA TURMENTADO

Dum la lastaj jaroj oni ĉiam pli kosciiĝas pri la graveco de seksa turmentado en oficejoj. Ne nur virinoj sed ankaŭ viroj suferas pro tio.

Nun la TUC proponas ke ĉiuj kontraktoj pri dungado enhavu la jenan klaŭzon:

„La sindikato kaj dunganto rekonas la problemon de seksa turmentado kaj celas neniigi tion. Oni difinu Seksan Turmentadon jene:

1. Ne-necesa tuŝado aŭ ne-dezirata korpa kontakto.
2. Amorvekaj rimarkoj aŭ alia verba insultado.
3. Okulumado al ies korpo.
4. Kompromitantaj invitoj.
5. Postuloj pri seksumado.
6. Fizika atenco.

Pledoj rilate al ĉi tiu klaŭzo estos traktitaj kiel eble plej rapide kaj konfidence.

Por korekti tiajn aferojn oni klopodos disciplini kaj reloki la krimulon ne la viktimon."


laŭ la „Daily Mail" 23/8/83
sendis: Milverton, Britio

## TERPOMO ANSTATAŬ ASPIRINO

Terpomo kelkfoje helpas anstataŭ aspirino kontraŭ la kapdoloroj. Unue, per la tri mezaj fingroj de ambaŭ manoj masaĝu la tempiojn. Tiam kelkfoje levu la nukharojn kaj frotu la kolvejnojn. Fine trinku glason da akvo je etaj glutoj kaj metu sur la frunton rondaĵojn de kruda terpomo. Se ĉio ĉi ne helpas, prenu medikamenton el la hejma apoteketo.

## LA PLEJ MALNOVAJ SKIOJ

La plej malnovaj skioj, faritaj antaŭ 2500 jaroj, estas gardataj en la muzeo de Oslo. Sed sciencistoj kredas, ke skioj estis ankaŭ antaŭe produktataj. Tiel oni asertas, ke la unuaj skioj estis faritaj en Siberio, pri kio atestas kavernaj desegnaĵoj, eltrovitaj en Siberio komence de ĉi tiu jarcento. Oni supozas, ke tiuj desegnaĵoj estiĝis komence de la tria jarmilo antaŭ la nova erao. Tiel sovetaj sciencistoj malkovris apud la urbo Pskov skiojn, kies malnoveco estas taksita je 4000 jaroj, kaj oni kredas, ke ili estas la plej malnovaj en la mondo.



## HEROINO EN MEDICINO

En Britio jam dum jardekoj heroino estas leĝe uzata en la kuracado de la lasta stadio de kancero kaj ankaŭ en la kuracado de aliaj formoj de neeltenebla doloro. La doktoroj rajtas preskribi tiun drogon por kiu ajn malsano aŭ vundo, tiel ke heroino estas preskribata ankaŭ al malsanuloj kun kormalsanoj, por la doloroj kiujn kaŭzas operacioj, kelkfoje ankaŭ por la naskdoloroj.

## SENKULPIGOJ

Novjorka instruisto, William R. Jackson, dum multaj jaroj notis la senkulpigojn de siaj gelernantoj. Li elektis kvin nekredeblajn por la neskribado de hejmaj taskoj:

1) La taskon manĝis mia fratineto,
2) Ne funkciis la centra hejtado kaj ni bruligis mian hejman taskon por varmiĝi,
3) Mi pruntedonis mian taskon al amiko kaj lia domo forbrulis,
4) La taskkajeron forportis rompŝtelistoj,
5) Apud nia domo alteriĝis flugtelero kaj ...

## KIEL LERNI?

En la lernejo jam delonge estis esplorataj metodoj, kiel plej sukcese akiri novajn konojn. Oni asertas ofte, ke la studentoj ne kapablas eltrovi la plej bonan vojon al sciakiro. Tiel en la universitato en Hradec Kralove en Ĉeĥoslovakio, post plurjaraj esploroj, la fakuloj konstatas, ke plejparto de studentoj ne posedas sian „propran" metodon kaj akcepteblan stilon en la lernado. Tiuj esploroj montras, ke 53 procentoj de la studentoj matene ne scias, kiel pasigi la sekvontan tagon. Proksimume 40 procentoj de la studentoj ne pensas ekscii la signifon de nekonata vorto en lernolibroj. 60 procentoj de ili transsaltadas tabelojn kaj grafikaĵojn, duono de la studentoj faras neniajn notojn dum la lernado kaj duono de la studentoj laŭvorte kopiadas la difinojn el la lernolibroj.

Laŭ la fakuloj farintaj tiujn esplorojn, la alilandaj studentoj neniel diferenciĝas. En la universitato en Hradec Kralove, unu el la plej konataj kaj malnovaj eŭropaj universitatoj, preskaŭ 60 procentoj de la studentoj lernas 'nokte antaŭ la ekzameno, 14 procentoj de ili lernas la tekstojn parkere kaj 22 procentoj de la studentoj antaŭ ekzameno ne certas, ĉu ili scias aŭ ne la ekzamenan materialon.

## AFRODIZIO

„Fruktoj kaj legomoj povas plibonigi la seksan vivon", asertas raporto de la Usona oficejo por esplorado de fruktoj kaj legomoj.

Melonoj, mangoj, abrikotoj, karotoj kaj spinacoj abundas je vitamino A, kiu helpas je la transformo de kolesterolo en aktivajn seksajn hormonojn. Terpomoj, bananoj kaj aliaj fruktoj aŭ legomoj enhavas ankaŭ vitaminojn de la B-grupo kiu same helpas la kreadon de la seksaj hormonoj. Tamen, la konata fakulo Waron Coleman negis la aserton jene: „Sensence estas diri ke iuj legomspecoj estas afrodiziaj. La sola vera instigilo estas la persono pri kiu vi revas."

## KISO

Iuj scienculoj asertas ke ĉiu kiso mallongigas la vivon je tri minutoj, tiel ke dudeko da kisoj povas mallongigi la vivon je tuta horo pro la senĉesa ŝanĝo de la kora ritmo, la rapidiĝo de la sanga cirkulado kaj aliaj stresaj okazaĵoj en la korpo!


MONTRITA HONESTO POST
80 JAROJ

Redoni la prunteprenitan libron el biblioteko estas normale, sed se tion faras iu post 80 jaroj, tiam tamen temas pri unuaranga surprizo. La Usonanino Lynn Barthel eniris la bibliotekon en San Rafael, proksime de San Francisco kaj ekpetis oficistinon ricevi 3 librojn, kiujn en la malproksima 1905 prunteprenis ŝia mortinta avino. Kvankam Lynn formale devus pagi 5000 dolarojn pro tiel longa reteno de la libroj hejme, la estraro de la biblioteko decidis ne „senproprigi" de dolaroj Lynn redoninta la libron, kiu ja vere ne kulpis.

ITALAJ MUZEOJ

Du trionoj de la italaj arta, arkitekta kaj historia riĉaĵoj estas kaŝitaj de la publikokuloj, estas dirite en la raporto de la itala instituto por statistiko. Laŭ la donitaĵoj de tiu instituto, el inter 35,7 milionoj da eksponaĵoj, kiom posedas la italaj muzeoj, nur 12 milionoj estas atingeblaj de la publiko. Verkoj neatingeblaj de la publiko, troviĝas en keloj kaj similaj fermitaj ejoj kaj nur parteto de ili, baze de apartaj permesoj, estas de tempo al tempo montrataj al interesuloj.

La plejparto de la italaj muzeoj estas en Romo (95), sekvas Florenco (90), kaj sur la tria loko estas Torino (49). Venecio kun siaj 34 muzeoj troviĝas sur la oka loko.



# ERETOJ

* * *

La unua mencio de cimoj troviĝas en skribaĵoj de la jaro 1017, trovita en Anglio.

* * *

Ludwig van Beethoven ŝatis nek akvon, nek sapon nek ordajn vestaĵojn kaj li iris tra Vieno tiel malbone vestita, nerazita kaj nekombita ke li plurfoje estis arestita kiel vagabondo.

* * *

E. F. Bruckmann, profesoro el Dresdeno, publikigis en 1739 la plej ampleksan bibliografion de libroj pri puloj en kiu li citis eĉ 175 verkojn pri la vivo de puloj, pri ilia neniigo, ktp.

* * *

La praĝermanoj faris buteron el lakto. Tamen ili ne uzis ĝin por manĝo sed por ŝmirado de la haŭto kaj la hararo.

* * *

La idaro de nur unu tinea paro povas dum unu jaro neniigi kvardek kilogramojn da lano.

* * *

Esploristoj el Dallas asertas ke la nefekundaj viroj kiuj nepre volas patriĝi devas konstante manĝi bananojn.

* * *

Aspirino estas la plej ŝatata medikamento en la mondo kaj ekzemple Usonanoj glutas ĉiujare 22 miliardojn da aspirinaj tablojdoj, t. e. meze cent po loĝanto.

* * *

Se hazarde estingiĝus la Suno, por anstataŭigi ĝian varmecon per teraj energifontoj, ĉiuj mondaj provizaĵoj de nafto, karbo kaj ligno elĉerpiĝus jam post tri tagoj.

* * *

Dum la mezepoko la homoj amase manĝis ajlon por defendiĝi kontraŭ pesto. Multaj homoj, krome, portis ajlokapon pendigitan ĉirkaŭ la kolo por ŝirmi sin de vampiroj kaj malbonaj naturfortoj.

* * *



La devenlando de tomato, iama sovaĝa tropika planto, estas Peruo kaj la Aztekoj nomis ĝin tomotle. En Eŭropon tiu ĉi nutra planto estas enkondukita nur ĉirkaŭ la duono de la deksesa jarcento.


* * *

Orienta proverbo diras „Kiam en dormoĉambro la lumo estingiĝis, ĉiu virino estas dudek-jara dum la viro ... havas sian aĝon."

* * *

La ruĝaj sangoglobetoj de rano estas kvinoble pli grandaj ol tiuj de elefanto.





JOHÁN VALANO

# ILI KAPTIS ELZAN!

## REVO PRI KASTELO

Li pensis al ŝi. Li neniam ŝin renkontis, sed pri ŝi li sciis multon: malbela, sed supere inteliganta virino, konata kiel ridema ĝojulino, ĉiam ema ŝerci kaj aliri la vivon el plej pozitiva angulo; kvankam fojfoje impresa, ŝi estis, laŭdire, fakte simpla persono, kun simpla rigardo al la mondo.

Nelonge, tamen, lia penso restis ĉe ŝi. Lia revo rapide transiris al ŝia kastelo. Vivi tie estus dono de la dioj. Hodiaŭ, kiam la nova plimulto en la urba konsilantaro – tiuj aĉaj socialistoj – decidis fari publikan promenejon laŭlonge de la rivero kaj tiel forŝteli parton de lia tiea bieno, li sentis pli kaj pli la emon iri vivi aliloke. Ĉu la kastelo de Montokalva ne estus plej mirinda vivloko? Ĉu ĝi ne estus eĉ pli bela signo de potenco ol lia nuna riĉula domo ĉe-rivera? Jes, ju pli li pensis pri ĝi, des pli la ideo plaĉis.

„Ĉu vi scias ion plian pri la afero?" li demandis sian sekretarion.

„Jes," tiu respondis, „ion, kio ne simpligas la situacion, bedaŭrinde. La grafino volas, ke oni absolute ne sciu, ke ŝi deziras edziniĝi pere de agentejo. Vi do devos aranĝi renkontiĝon tiamaniere, ke ĝi aspektu kiel eble plej natura, neplanita."

## KIEL ESTIGI AMON

„Nu, tio estas via tasko, knabo. Vi aranĝu ion, por ke ni renkontiĝu. Restu al mi nur aliri ŝin kaj diri: 'Grafina moŝto, mi deziras edziĝi al vi. Bonvolu subskribi la interkonsenton'."

„Ne, ne, ne, ne, sinjoro. Ne eblus. Tiel vi fuŝus ĉion. Sed, se vi permesas la demandon, ĉu vi estas tute certa, ke vi volas edziĝi al ŝi? Ĉu vi ne deziras konsideri aliajn eblecojn?"

„Ne. Mi decidis. Vi donis al mi ĉiujn informojn pri ŝi: ili konfirmas, kion mi aŭdis diversflanke. Ŝi estos mia edzino. La celo estas decidita. Nur restas difini la rimedojn."

Rapidvola s-ro Pipelbom ĉiam estis, kaj al tiu eco Johano delonge kutimiĝis, sed ke, ne konante virinon, lia mastro firme decidis ligi sian vivon al ŝi, nur post kelkminuta konsiderado, tio estis malfacile kredebla. Tamen, estis fakto: la tuta sinteno de s-ro Pipelbom, kaj lia vizaĝa esprimo, ne lasis pri tio eĉ plej malgrandan dubon.

„Mi diskutis la aferon kun la ĉefservisto de sinjorino la grafino," Johano plu parolis. „Li diris al mi, ke plej bone estus agi tiamaniere, ke ŝi renkontu vin en cirkonstancoj, en kiuj vi aperu kiel eble plej admirinda, t.e. en cirkonstancoj, kiuj veku amon de ŝi al vi."



Desegnis Teodora Kučinac

„Ĉu la simpla fakto, ke la fama Adriano Pipelbom proponas al ŝi geedziĝi, ne sufiĉus, por ke ŝi jesu?"

„Ne. Virina menso ne reagas, kiel tiu de aĉetanto. Vi devas estigi amon en ŝi, aŭ vi malfeliĉos dum la tuta posta vivo."

„Verŝajne vi pravas. Sendube vi pravas. Jes, mi komprenas. Mi devas prezenti min al ŝi tiamaniere, ke ŝi ekamu min. Sed kiel fari? Kiel oni vekas amon en virino? Ĉu vi scias? Ĉu vi havas ideojn?"

Johano hezitis. Li preskaŭ komencis paroli, fakte jam malfermis la buŝon, sed tuj refermis ĝin.

„Mi vidas, ke vi havas ideon. Kial vi ne diras ĝin tuj?"

„Pardonu min, sinjoro. Mi konsideras, ĉu ĝi taŭgos aŭ ne. Nu, mi submetu ĝin al vi. Mi pensis jene: se oni savas homon el danĝero aŭ malagrabla situacio, la savito emas ami la savinton, ĉu ne?"

„Prave! Tute brila ideo! Ni provu estigi situacion, en kiu mi povos aperi kiel tiu, kiu savis ŝin el terura danĝero. Tio certe efikos."

„Se ni tr..."

Pipelbom interrompis.

„Jen mi havas ideon: vi faligos ŝin en la riveron, kaj mi staros apude, kaj ĵetos min en la akvon, kaj ŝin savos."

„Ĝuste pri simila situacio mi pensis, sed via propono enhavas malfacilaĵon: ĉu vi vere kapablus savi ŝin?"

Pipelbom enpensiĝis dum minuto.

„Mi timas, ke ne," li fine diris. „Mi malbone naĝas. Kaj savi ... nu, tio eble ne estas facila. Ni trovu ion alian."

Ambaŭ viroj profundiĝis en longa silenta pensado.

Fruktodone.

* * *

## DIANA KAJ JOHANO

„Diana!"

„Jes, Johano."

Ili sidis en agrabla restoracio, en trankvila angulo, kie oni forgesis la ĉeeston de aliaj manĝantoj. Li metis sian manon sur ŝian.

„Antaŭ kelkaj tagoj mi estis en hospitalo. Prizorgis min tie tre bela flegistino. Lucia. Mi opiniis, ke mi amas ŝin, sed ..."

„Sed ... ?"

„Sed nun ne plu. Estas evidente, ke mi povas ami nur vin."

„Estas evidente, ke la suno turniĝas ĉirkaŭ la tero, ĉu ne? Tion vi certe vidis mem, konstatis propraokule. Ĝi ekaperas el unu flanko kaj malaperas ĉe la alia flanko, ĉu ne?" ŝi rebatis, kun rido en la okuloj, sed buŝo serioza.

„Kion vi volas diri?"

„Ke kelkaj ideoj estas evidentaj, sed neĝustaj."

„Diana!"

„Nu, mi ne scias. Eble vi povas ami nur min. Kompatindulo!"

„Kial mi estus kompatinda?"

„Ĉar mi trompos vian atendon."

„Ĉu vere?"

(daŭrigo en la sekva numero)

# OV-INSTITUTO

Mirka Tomečková



# ŜERCOJ

## EN LA VAGONARO

En la vagonaro konduktoro diras al vojaĝanto:

– Vi havas bileton por regula trajno kaj tiu ĉi estas ekspresa.

La vojaĝanto respondis:

– Diru al la lokomotivestro ke mi ne rapidas.

J. Jovanovic

## EN LA TUNELO

La trajno trapasis tunelon kaj iu virino diris al sia edzo:

– Kio okazis? Vi kisis min en la tunelo. Tio estas surprizo.

Furioza edzo respondas:

– Ne mi kisis vin. Mi dezirus scii kiu viro eluzis la mallumon, mi montrus al li kiamaniere li devas konduti.

La edzino, ridante diris: – Vi povas al li nenion montri. Li tion faras pli bone ol vi.

J. Jovanovic

## LA REKONILO

Edzo (kolere): Ĉe ĉi tiuj malbenitaj ŝtrumpoj mi vere ne scias, kiu estas la supra fino kaj kiu la malsupra!

Edzino (trankvile): Ho, stultulo! Kie estas nur unu truo, tio estas la supra fino. Kaj kie estas multaj truoj, tie estas kompreneble la malsupra.

## NUPTVOJAĜO

Skot-gefianĉoj nuptvojaĝas.

Antaŭ envagoniĝo la edzo aĉetas ĉokoladon. Li duonigas ĝin kaj parton donas al sia edzino, la alian enpoŝigas.

– Ĉu vi ne manĝas? – demandas la juna edzino.

– Ne – respondis la edzo – Mi lasas ĝin por la infanoj.

M. Bilaus

## METODO

Juna kuracisto interesiĝas ĉe sia pli aĝa kolego, kial li demandas de ĉiuj malsanuloj, kion ili matenmanĝis.

– Ĉar tio estas la plej ĉefa, kara mia. El tio mi povas konstati la kondiĉojn en kiuj li vivas, kaj laŭ tio mi petas la sumon por la konsultado.

M. Bilaus

## PRUVITA ŜTELO

El la provizejo malaperis du kilogramoj da butero. Oni suspektas la katinon. Por havi certecon pri la grava okazintaĵo, la mastrino metas la katinon sur la pesilon kaj konstatas:

– Precize du kilogramoj! Do la buteron ni trovis, sed kie estas la katino?

## RUZA PETO

– Panjo petas vin prunti al ŝi vian radio-aparaton.

– Kion? Ĉu oni volas danci ĉe vi en ĉi tiu malfrua horo?

– Ne, sed dormi!

## TRANKVILIGO

Nervema fraŭlino en la aviadilo: Vi tamen portos min denove sendanĝere sur la teron, ĉu ne?

Piloto: Ne maltrankviliĝu, fraŭlino; dum mia tuta kariero mi ankoraŭ neniam lasis iun supre.

## DUBA HONESTECO

Juĝisto: Ĉu vi estis sola kiam vi ŝtelis tiujn objektojn?

Ŝtelisto: Jes, sinjoro juĝisto, ĉar oni neniam scias, ĉu la kamarado estas honesta.

# ENIGMOJ

## ĈEVALIRO

Komencu en la supra maldekstra kvadrateto kaj saltu kiel ĉevalo sur la ŝaktabulo, tiel ke vi divenu proverbon.

| | | |
|---|---|---|
| Ra | gran | da |
| la | lo | ro |
| mal | pi | da |
| va | bo | ro |

## PROVERBO

Vi trovos ĝin, se vi komencos ĉe la signita litero elekti literojn en la figuro unu post la alia (ĉiu litero estas uzenda nur unu fojon) en la kontinua linio, kiun vi devas ne trapasi.

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| A | M | S | A | F |
| R | T | A | R | J |
| O | S | E | O | A |
| E | R | D | I | K |
| T | N | I | R | O |


(Janez Jug)

Solvo de la rebuso el la antaŭa numero: INTERNACIA KULTURA SERVO

## LABIRINTO

Helpu al knabo trovi la ĝustan vojon ĝis la kaŝita mielujo.

Desegnis: Ĝuro Janĉi



# INTERNACIA HELPO

Ĉi nokte vi ne povis dormi? Viaj problemoj ŝajnas al vi nesolveblaj? Vi sentas vin tute sola kaj senpova en tiu ĉi vasta mondo? Ne estu pesimisto, levu la kapon! Almenaŭ „Ovo"-redakcio pensas pri vi. Por helpi al vi ni enkondukis la rubrikon „Internacia Helpo". Tio signifas ke ne nur la redakcio, sed ankaŭ nia legantaro kunhelpos ...

Mi malsaniĝis en la aĝo de 40 jaroj je osta artrozo. Tial mi preskaŭ ne plu povas marŝi. La kuracistoj ne havas la kuracmanieron. Ĉu la internacia komunumo scias ion kion la medicino ne scias? Laŭ la medicino mi estas kondamnita al kompleta invalidiĝo.

Sergej Korotkov

EKSPOZICIO DE JUNULARA GAZETARO – Okaze de la Internacia Junulara Jaro, Internacia Kultura Servo kaj internacia gazeto por distro kaj amuzo „Ovo" organizos grandan internacian ekspozicion de junularaj kaj porjunularaj gazetoj. La ekspozicio estos malfermita en oktobro en Zagrebo. Oni do petas ĉiujn sendi ekzemplerojn de sia nacilingva junulara gazeto de kiu ajn speco. Por vi ĝi ne estos granda elspezo, por ni grava evento kaj propagandilo. Lastfoje Internacia Kultura Servo el Zagreb organizis similian ekspozicion de naciaj legolibroj el 50 landoj helpe de esperantistoj. La ekspozicio havis grandan reeĥon kaj helpis Esperanton por penetri en lernejojn de Kroatio. La ekspozicio post la prezento en Zagrebo povos migri al aliaj urboj kaj landoj. Jen la adreso: „Ovo" – IKS, Amruševa 5/I, 41000 Zagreb.

Samarkanda Esperanto-klubo de Interpopola Amikeco daŭre kolektas ĉiulandajn kaj ĉiulingvajn porpacajn afiŝojn, flugfoliojn, fotojn, (infan)desegnaĵojn, librojn, revuojn, ĵurnalojn, lumbildojn, gluafiŝetojn, poŝtmarkojn, ĉiujn ceterajn pacpropagandilojn. La materialoj estas serĉataj por la jam tradiciaj internaciaj porpacaj ekspozicioj. Bonvolu adresi ĉion al: Interklubo „Esperanto", SU-703000 Samarkando, Glavpoĉtamt, abon. ja. 76, Uzbekistano, USSR.

Ĉu vi konas jam „Internacian korespondan adresaron"? Ĝi aperas ĉiumonate kaj jare alportas 1500 anoncetojn el 150 landoj de kvin kontinentoj. Unusola kaj la plej unika periodaĵo eldonata en socialismaj ŝtatoj. Jarabono 24 IRK, aŭ ekvivalento. Publikiĝo de anoncetoj senpaga. Adreso de la redaktanto: Emil Egner, Třída míru 19, CS-370 01 České Budějovice, Ĉeĥoslovakio.

# ovo mem

„OVO"
INTERNACIA GAZETO POR DISTRO KAJ AMUZO
Aperas 15 foje jare.

ELDONAS: Kroatia Esperanto-Ligo, Amruŝeva 5/I, 41000 Zagreb, Jugoslavio.
KONSILANTARO: Ljerka Begiĉ, Zlata Cundekoviĉ, Đorđe (Ĝorĝe) Dragojloviĉ, Gordana Plavŝiĉ, Slavko Ŝimuniĉ, Ivica Ŝpoljarec, Spomenka Ŝtimec.
REDAKCIO: Milena Grgiĉ, Jozo Mareviĉ, Nikola Raŝiĉ, Slavko Ŝimuniĉ (ĉefa kaj respondeca redaktoro), Ivica Ŝpoljarec (grafika kaj teknika aranĝo), Zlatko Tiŝljar, David, Rey.
ADRESO: „OVO", Kroatia Esperanto-Ligo, Amruŝeva 5/I, 41000 Zagreb, Jugoslavio, tel. (041) 424-660.
PRESAS: Srednja ŝola tiska in papirja, Ljubljana, Jugoslavio.
PREZO de unu ekzemplero: 3 guldenoj (aŭ egalvaloro), por Jugoslavio 60.- din.
JARABONO: 35 guldenoj (aŭ egalvaloro), por Jugoslavio 700.- din.; validas por 15 numeroj ekde la momento de la enpago.
PAGU per poŝtpagilo al la adreso de la eldonanto aŭ al la perantoj.

PERANTOJ

BELGIO: Eldonejo „Sonorilo", Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk kaj Flandra Esoperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen
BRAZILO: „Fonto", Caixa Postal 49, BR-89800 Chapeco, S. C.
BRITIO: Brita Esperanto-Asocio, 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF
FRANCIO: Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris
FR GERMANIO: Esperanto-Centro, Postfako 1450, D-4790 Paderborn
KANADO kaj USONO: Zdravka Metz-Fleury, 6358 de Bordeaux, Montréal, Québ. H2G 2R8
NEDERLANDO: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam
SVEDIO: Eldona Societo Esperanto, Box 7502, S-200 42 Malmo
SVISLANDO: Jadranka Zadro-Mikuličić, Via Tabio 5, CH-6500 Bellinzone

# ANSERAJ OVOJ

## ga, ga...

Ŝajnas ke nia ĉefredaktoro ŝanĝis sian opinion pri mi. Antaŭe li tute ne permesis al mi paroli kun iu nome de nia revuo, kaj nun li eĉ petis min akcepti nian faman sciencistoin post lia reveno el Usono kaj fari kun li intervjuon por nia revuo. Mi scias ke niaj sciencistoj estas iom pli saĝaj ol ni anseroj kaj pro tio mi bone preparis demandojn por ĉi tiu intervjuo.

– Bonan tagon, kaj bonvenon al niaj 'Ovo'-paĝoj – dece salutis mi.

– Bon tag. Dank' – serioze respondis li. ??!?

– Pardonu, mi petas ... – mallaŭte kaj nesekure diris mi.

– Ki okaz? – daŭrigis nian interparoladon li.

– Fakte al mi ŝajnis, ke mi ne bone aŭdis vin ...

– Vi cert bon aud mi, sed mi parol nov esperant – komencis sian prelegon nia fama sciencisto. – Jam evidentiĝ la malfacilec de tiu ĉi lingv ki dev est la plej facil el ĉi lingv ĝis nun ekzistant kaj neni plu fanfaron ke ĝi est facil. Sed dum long temp ni sciencist ne pov respond ki ĝi ne est pli facil. La histori honor por ti malkovr aparten al geni de dr. J. C. Wels kaj mi modestec. Ni pritrakt la problem dum kurs en San Francisk, Uson, kaj ven al la konklud ke la malfacilaj kuŝ en la finaj. Ili simpl est superflu! Ĉu vi ne kred? Ĉu vi bezon la pruv? Jen ĝi! Ĉu vi ne kompren mi?

– Ho jes, nome ne – ne sciante kion diri – mi provis ŝanĝi la temon – Ĉu vi kredas ke Esperanto pli bone funkcios post malkovro de tiu ĉi „Nov esperant" – starigis mi novan demandon.

– Jes, cert! Tut jarcent ĝis nun nia lingv est troŝarĝit per neneces balast. Al ĝi ŝuldiĝ la fakt ke ni movad tut ne kresk dum ti cent jar. Est kulp ankaŭ la esperantist mem. Car ili est tro konservativ kaj ĉiam kontraŭ iu ajn ŝanĝ. Ti reakci socikomunum dev est kontraŭ ĉia progres kaj malantaŭenig ni afer por miljar. Sed jen la problem solvit! La nov propon est ti simpl kaj konvink ke mi kred ke neni malakcept ĝi. Ĝi eĉ ne est kontraŭfundament ĉar la fundament ĝi tut ne tuŝ nek ŝanĝ io en ĝi. Ĝi simpl ne uz unu part de la fundament. Ĉu tio est pek?

– Jes, sed kio okazos kun la gramatiko?

– Tre simpl, ĝi ne plu ekzist! Neces nur lern la vort kaj kunmet ili ki ebl plej logik!

– Kaj la akcento, kion vi proponas ...?

– Ankaŭ tre simpl, ĝi est ĉiam sur la last silab. Tio tre grav en ĉi epok ki ĉi uz kalkulil kaj ne sci plu nombr ĝis tri.

– Vi certe kredas ke via nova lingvo bele sonoros ...

– Klar ... Mult pli bel ol ĝis nun. Ĝi eĉ est tre oportun por poezi. Doktor Wels jam pruv ti per si adapt de la fam poem de la Majst. Jen ĝi, kaj vi juĝ:

Tra dens mallum brilet la cel
Al kiu kuraĝ ni ir
Simil al stel en nokt ĉiel
Al mi la direkt ĝi dir!

Kaj tiel plu ... ĉu ne sonor bel?

– Vere sensacie. Ni tre ĝojas ke ni estas la unuaj kiuj aperigas la novaĵon pri via malkovro. Sed ĉu la publiko jam diris ion pri tio?


– Jes la reeĥ de la publik ĝis nun est perfekt. Jen ankaŭ „Ov", la plej modern ni gazet skrib pri ti. Mi esper ke ĝi estont ced al la nov esperant unu paĝ. Do help la revoluci por la bon de l' homar por prosper de ni afer!

– Mi parolos kun nia redakcio, vi vere konvinkis min, kara amiko. Via eltrovaĵo ŝajnas al mi esti genia. Mi dankegas al vi estimata sinjoro, ĝis revido, samideano Raŝiĉ.

– Pardonu, ne plu Nikola Raŝiĉ, nun mi est Nik Raŝ en Nov esperant.

# O V A Ĵ O J

Mirka Tomečkova, Ĉeĥoslovakio




## KONKURSO!

SENDU AL NIA REDAKCIO ĈION KIO ESTAS LIGITA KUN OVO KAJ OVUMADO.

Ekzemple: ŝercojn, karikaturojn, fotojn, poemojn, rakontetojn, rebusojn, proverbojn, receptojn pri ovomanĝoj ktp., aŭ ion pri la sciencaj esploroj pri ovoj, pri ovo en diversaj lingvoj, pri la rolo de ovoj en la homa historio, pri la specoj de ovoj, do, pri ĉio ajn ligita kun ovoj.

Vi povas sendi ion kion vi mem elpensis aŭ verkis, ion kion vi ie vidis, tralegis, pruntis aŭ ŝtelis.

Sur la paĝoj de OVO ni aperigados viajn kontribuaĵojn kaj premios la plej kvalitajn.

Jen nia adreso:
Kroatia Esperanto-Ligo
(„OVO"–konkurso)
Amruševa 5/I
YU-41000 Zagreb

## FOTO

Ekzistas neimageble multe da homaj vizaĝoj, loĝlokoj, pejzaĝoj kaj vivsituacioj dise tra la mondo. Neniu el ni, en sia vivo, havos okazon vidi ĉiujn ekzistantajn belaĵojn, ĉeesti ĉiujn okazaĵojn kaj renkonti ĉiujn homojn, sed ĉiu el ni posedas la parteton de la tuto.
Ni deziras ke pere de fotoj, en tiu ĉi rubriko ni interŝanĝu niajn bildajn posedaĵojn; simple por pli senti la kunestadon kaj por pligrandigi nian konon pri la mondo.
Al ĉiu foto kiun vi sendas aldonu mallongan priskribon.

### PIF

La fama Pupteatra Internacia Festivalo okazas ĉiujare en Zagreb kaj Velika Gorica, Jugoslavio. Dum la festivalo profesiaj pupteatroj el la tuta mondo prezentas siajn altkvalitajn prezentaĵojn plej ofte en Esperanto kiu estas la oficiala lingvo.
La 18-a PIF okazos inter la 24-a de aŭgusto kaj la 1-a de septembro 1985. La organizanto estas Internacia Kultura Servo, YU-41000 Zagreb, Amruševa 5/I.
Pupartо ne estas nur por infanoj.

Fotis: Ivica Špoljarec – Štef

